

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 61 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 julio 1925

ESPERANTO AND WIRELESS.

The number of European stations which regularly broadcast Esperanto programmes or courses is steadily increasing. The following particulars are interesting and show that listeners in can pick up something in Esperanto every day in the week in Europe. The stations are—Konigswusterhausen, Sundays, Esp. programme; Radio Paris, Esp. Course, (Dr. Corret); Hamburg, Mondays, Ten minutes of Esperanto, (Minor); Rome, Esp. Course; Wednesday, Konigsberg, Esp. course; Kobenhavn, Esp. programme; Barcelona, Esp. lessons; Munster, Esp. course; Thursday, Munchen, Esp. lessons and readings; Stuttgart, Esp. lessons; Paris, Esperanto course, (Prof. Cart); Fridays, Frankfort, Esp. lessons; Moscow, Esp. course; Saturdays, Berlin, Esp. course; Konigsberg, Esp. course.

Permission has just been given in Roumania to instal private sets.

The Bregi-Koprivica Esperanto Club has a set in the club room. members have heard Paris, London, Zurich, Vienna, Graz, Berlin, Breslau, Rome and Warsaw.

The "First International Congress of Radio Amateurs was held in Paris from 14 to 19 April. Early in the sessions a special committee was appointed to report on the International Language problem. The Commit-

tee consisted of Dr. Privat, president, S-roj Turner and Nordin, (Swedish Idist), vice-presidents and S-ro Epton, secretary. This committee by 13 votes to 2 recommended Esperanto, and, subsequently, the full congress, with the exception of one vote for English and one for Ido, unanimously carried the following resolution:—

(a.) The first Congress of the International Union of Radio Amateurs recognising the difficulties caused by the diversity of languages decides to recommend the study and use of Esperanto as an auxiliary language in radio telephonic communications and broadcastings and for summaries or translations in periodicals and Congresses.

(b.) The same recommendation is made regarding radio - telegraphic communications when the correspondents fail to understand

each other in a national language.

(c.) In accordance with this decision, this Congress adopts Esperanto as its auxiliary language in conjunction with national languages it uses.

The Congress President was M. Edouard Belin, President of the Radio Club of France, who was supported by General Ferrie, Chief of the French Military Service, and Mr. Hiram P. Maxim, President of the American Radio Relay League. Over 250 persons took part in the opening ceremony, 22 nations being represented. Speeches were made in French or English.

The principal subject for discussion at the Conference was the formation of the International Amateur Radio Union, based on a constitution proposed by the American Radio Relay League, concerning which a number of amendments had been submitted by the French societies. The other subjects dealt with the international organisation of tests and two-way communications between amateurs, the allocation of wave lengths between amateur and radio-telephonic transmissions, the re-arrangement of call and intermediate signs, and finally, the selection of an international auxiliary language.

Mr. H. A. Epton, Secretary of the International Radio Asocio (of which M. Belin is Honorary President) made a short speech in Esperanto, thanking M. Belin for his kindness and for the trouble taken by him, and in the name of the Esperantists present wished him success. This speech appeared to be understood by all present—in fact, a little incident in connection with it is worth recording. When Mr. Epton had finished speaking a gentleman standing behind him, a distinguished Belgian Government official attending the congress, patted him on the shoulder and assured him in English that he had understood every word although he had never studied Esperanto!

The report of the First Committee was unanimously adopted amidst great enthusiasm, thus marking the birth of the International Amateur Radio Union, the commencement of a new epoch in the history of amateur radio.

Although it had first been proposed that the new Union should be composed of national radio societies, concerned solely in the promotion of two-way communication between amateurs by means of radio-telegraphy, on account of the strong opposition to this proposal, it was decided to make the Union one of individuals instead of societies, and to throw it open to persons interested in the advancement of the radio art, thus enabling all seriously interested in radio to co-operate.

The annual subscription will be One Dollar, and the members in each country, if at least 25, shall form a national section, each such section be

ing entitled to one vote in the affairs of the Union.

A Congress will be held every two years, and officers will hold office for two years. The international officers and the president of national sections will form a Board of Directors, who will have power to elect an Executive Committee to manage the affairs of the Union.

JAPANESE PROFESSORS OF MEDICINE ADOPT ESPERANTO.

"La Revuo Orienta" again points out that Esperanto is very favourably looked upon by the medical profession in Japan. Before the commencement of his anatomical course at the Tokio Imperial University, Professor Dr. Seiho Niši informed his students that he would use Esperanto terminology, instead of the German, as used by other professors. Dr. Tomosaburo Ogata, professor of pathology at the same University, commenced his course of lectures with an Esperanto phrase. In the pharmacy course up till now German has been the language in use, but Professors Drs. H. Hajaši and K. Tamura have prepared an Esperanto vocabulary and will use it during the coming term. The students, apparently whether they like it or not, will have to learn Esperanto. During this year there will be a conference of the Society for the study of tropical diseases. Some of the medical speakers are preparing to read their papers in Esperanto. Esperantist professors have now decided to publish a series of Esperanto translations of the theses submitted for the medical degree. Medical men elsewhere are asked if it is not advisable to learn the easily acquired Esperanto, if only to acquire a knowledge of the progress of Japanese medicine, for example the study of "berri-berri," etc.

THE POPE ENCOURAGES USE OF ESPERANTO.

Prof. M. Carolfi, President of the Italian Catholic Esperanto Association informed the Pope of the great utility of Esperanto and was afterwards informed by Cardinal Gasparri that His Holiness had been pleased to accept the documents submitted as showing the helpfulness of Esperanto in the spread of the Gospel.

RECENZO.

LA GARDENO, Esperanto-versajoj, eldonita de la verkisto, Menahemo Sapir.

La aŭtoro sendinte ĉi tiun unuan libreton aperintan en Erec-Israel petis esprimon de opinio pri ĝi. Jen ĝi estas. Ŝajnas ke la verkanto havis emon versfaradi, sed ankaŭ ŝajnas, ke li ne havis frapantajn ideojn esprimi, aŭ, havante tiajn, li nur mezbone povus priskribi ilin. Tamen la

ritmo ne forestas, kaj, se la aŭtoro nur povas trovi veran temon, mi ne dubas, ke li verkos ion inda de legado. (C.W.B.)

THE BENSON PERSONAL MAIL COURSE IN PRACTICAL ESPERANTO. 20 Mercer st., Newark, N. J., U.S.A., prezo dek dolaroj.

Ĉi tiu estas la plej ambicia provo ĝis nun farata ie por instrui Esperanton de unu centro tra la tuta mondo. La lecionoj havas tre multajn bildojn kaj celas uzi nur Esperanton de la komenco de la instruado. D-ro W. S. Benson certe estas tre kuraĝa elspezi tiom grandan sumon, kiom li nepre devis, pretigante la kurson. Kiam izolulo petas informon kiel lerni nian lingvon sen persona instruanto, oni nun povas doni la adreson de Benson. Iuj malkorektaĵoj vidiĝas en la specimenaj lecionoj, sed sendube ili estas pro neesperantista presisto kaj estos forigitaj el ia estonta eldonado. (C.W.B.)

Our samideano, Professor Uhrlaub, addressed the South Australian Division of the Wireless Institute of Australia at Adelaide University on May 6th on the subject of Esperanto as the Radio Language. The address seems to have impressed the gathering.

OUR SUPPORTERS.

Mr. D. B. Thomson, Ipswich.—“I hope the ‘Suda Kruco’ will still be published as a tie between the isolated Esperantists of Australia.”

Miss H. Batchelor, Hobart.—“If the ‘Suda Kruco’ is discontinued it will be a backward step Australia ought to be able now to support a paper and the one we have would improve if more would subscribe. Money is what is wanted and sympathy and patience from our various groups.

Mr. A. Madarasz, Brisbane.—“I regret that the last Congress was antagonistic to the ‘Suda Kruco,’ but I do not doubt that, with the help of its supporters, it will continue to be published to give pleasure to Australian Esperantists in the future as it has done in the past.”

Miss L. O'Connor, Brighton.—“I look forward each month to receiving the ‘Suda Kruco.’ I hope our paper will live and grow.”

Miss L. Saw, Camberwell.—“I sincerely hope the Suda Kruco will prosper. I should very much regret to see it cease publication.” I enclose my subscription, also a donation of 10/6.”

Mr. W. H. King, President of the last Congress and a former President of the A.E.A. sends a donation of 10/-.

La nova alservistino ĵus alvenis, kaj la mastrino sciigis al ŝi kelkajn informojn pri ŝia laboro. “Nu, sinjorino B.,” finante ŝi diris, “bonvolu memori, ke mi estas virino nemultvorta. Se mi mansignas, tio signifas ‘Venu.’” “Tio bone plaĉos al mi, sinjorino,” respondis la alservistino, “car mi ankaŭ estas virino nemultvorta. Se mi kapskuas, vi komprenos, ke tio signifas ‘Nenio farota.’” (Trad. S. Trewin.)

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Cu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Porta ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ESPERANTO.

Ordinare, simpla vorto enhavas nur unu ideon sed malgraŭ tio ĝi estas disigebla kaj la disiganto trovas, ke ĝi bezonas nombron da ioj, nomataj literoj, por esprimi la ideon.

Mi disigos la vorton Esperanto kaj eble mi montros, ke same kiel simpla vorto bezonas literojn por kompletigi la ideon, tiel ankaŭ Esperanto bezonas ideojn por kompletigi la sencon.

Ni konsideru la vorton "saĝo"; ĝi prezentas nur unu ideon, t.e. meblero, sed se oni aldonas la prefikson "brak—" ĝi fariĝas vorto kiu prezentos du ideojn. Ne nur ĝi estas meblero, sed ĝi estas aparta speco de meblero "brakseĝo."

Unuavide Esperanto nur montras unu ideon. Mi volas montri kiamaniere ĝi havas multe pli ol unu ideo.

Same kiel la vorto "tablo" bezonas la kvin literojn por kompletigi la ideon de tiu meblero, tiel ankaŭ Esperanto bezonas ecojn por kompletigi la ideojn, kiujn ĝi enhavas.

La unua eco laŭ la ordo de la literoj en la vorto Esperanto estas. **Energieco.**

Sen tiu-ĉi eco nenio povas daŭri longatempe. Nia majstro Dro. Zamenhof montris grandan energion por siaj senĉesaj penadoj naskigi internacian helpan lingvon kaj sendube se li perdis la energion la mondo neniam estus posedinta Esperanton.

Kvankam Esperanto bezonas la energiecon ĝi utilas neniel se ne ekzistas personoj por direkti ĝin en la ĝustan vojon kaj tiuj personoj estas la Esperantistoj.

La dua eco estas **Seriozeco.**

Se ni deziras interesigi pensemajn personojn ni devos vidigi al ili, ke Esperanto ne estas ŝerco, nur io por pasigi la tempon, sed ke ĝi valoras esti traktata kiel gravan aferon.

Mi elektas por la tria eco: **Pacemeco.**

Ebla tiu-ĉi estas la plej grava el ĉiuj, ĉar ĝi prezentas idealon, kiu servas kunligi la diversajn popolojn de la terglobo. Pacemeco nur ekzistas en la menso. Jen estas da personoj aŭskultante al muzikaĵo. Unu estas kontentigita, la alia tedeigita. Kio estas la kialo de la diferenco. Ŝajne la muziko, sed, se ni enrigardas en la aferon pli profunde ni

eltrovas, ke la diferenco ekzistas ĉe la mensoj de la du aŭskultantoj.

La muziko mankis kontentigi la du personojn ĉar ĝi nur vokis al unu menso.

Esperanto devas posedi tion, kio vokos al la menso de ĉiu, kiu renkontos la movadon.

La kvara eco estas **Espereco.**

Se ni havas pacan staton inter diversaj naciuloj ni ne povas ne esperi, ke ni altiĝos ĝis pli inda nivelo.

Esperanto — tiu, kiu esperas — sukcesos neniel se li ne ankaŭ agas.

Antaŭ nelonge mi vidis tiun - ĉi anoncaĵon. "Ne esperu por la plej bona, envenu kaj akiru ĝin."

La Esperantistoj devas eniri kaj akiri tion, por kio ili esperas. t.e. "La fratigado de la mondo."

Mi metas **Raciecon** ĉe la mezo, ĉar ni ne povas fari multe da malutilo kiam ni havas tian econ ĉe la koro de aferoj.

Mi aldonu **Adapteblecon.**

Esperanto devas esti adaptebla, alie ĝi ne valoras multe. La pruvo de elpensado estas laŭ ĝia adaptebleco. Esperanto estas elpensado kaj devas meriti, ke la mondo pensu pri ĝi, kiel io, kion ĝi povas adapti kaj tiel plibonigi la staton de aferoj, kiu ekzistas hodiaŭ.

Por ke ĝi estu vere internacia, Esperanto devas posedi **Neŭtralecon.**

Kiel longe ĝi tenas neŭtralan flankon, tiel longe ĝi ne trudos sin je iu ajn, kaj tial ĉiu povos bonvenigi ĝin, bone sciante ke ĝi celas forigi nenion, krom la barilon de nekomprenebleco.

Mi komencis la liston per **Energieco**, sed tio ne povos daŭri por ĉiam sen ĝia komplemento **Tenemeco**. Se mia lingvo celas esti la sola internacia lingvo pruvanta sian utilecon super ĉiuj konkurantoj ĝi devos montri, ke ĝi posedas teneman pelpovon, kiu restos ĝis la fino.

Laste sed ne malpleje mi aldonas **Oferemeco**. Posedante tiajn ecojn, kiam ni havas supre, valoras, ke ni estu pretaj doni tiajn servadojn al la celoj de la internacia lingvo movado.

Tiamaniere mi silabas Esperanton: — **Energieco, Seriozeco, Pacemeco, Espereco, Racieco, Adaptebleco, Neŭtraleco, Tenemeco, Oferemeco.**

(Mallongigita el parolado farita de S-ro R. J. Dodd, B.E.A., antaŭ la Sydney Esp. Soc.)

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

—
Estimata samideano,

De tempo al tempo oni legas pri ranoj, kiuj troviĝis ankoraŭ viva en la mezo de solida roko. Tiuj report-oj estas nekredeblaj, ĉar en tiuj okazoj, la ranoj devas esti centojn da jaroj aĝaj, sed oni ne povas dubi, ke ranoj ja vivas dum du aŭ tri jaroj, malliberigitaj en malmola sekiginta koto, ĉe la centraj regionoj de Aŭstralio. Estas nur pro tio, se ili povas fari tion, ke ili povas vivi dum la longaj pluvmankaj periodoj, kaj flankaje provizi la indiĝenojn per akvo por trinki je la plej akvomanka periodo.

La indiĝenoj gvidataj per la malgrandaj truoj, facile trovas la lokon, kie la rano estas havebla, ĉirkaŭ 12 colojn malsupre en la sekiginta koto de ia rivereto. Tiuj ĉi ranoj, kiam elfosita el siaj sekavetara loĝejo, estas tute rondaj, kaj vastkorpaj, kaj en iliaj korpoj troviĝas multe da freŝa kaj trinkebla akvo, kio estas ŝatata kaj de la vojaĝanta blankhaŭtulo en tiuj distriktoj kaj de la indiĝenoj. Kiam pluvis, tio estas post daŭra pluvo, kiu penetras al la kaŝejo de la rano, ĝi tuj vekigas, kaj post kelkaj horoj la aero resonadas per la kvakado de miloj da ranoj, kie iom da tempo antaŭe oni ne povis kredi, ke ekzistis eĉ unu rano.

Riĉeco atendas la homon, kiu estos sufiĉe lerta elpensi ian efektivan metodon havigi la oron el la riĉaj sabloj, kiuj troviĝas laŭ la marbordoj de la suda insulo de Nova Zelando. Tia sablo ĝis granda profundeco sin etendas pli ol cent mejlojn sed la sablo mem estas tiel peza, ke ĝis nun, nenia metodo sukcesis apartigi la oron je sufiĉa profito. Post ĉiu ventego, je la elfluinta tajdo, rubando de flavo etendiĝas por mejloj laŭ la marbordo lavadita de la fortaj ondoj. Dum kelkaj horoj la oreretoj

estas videblaj; tiam ĉe la enfluo de la tajdo ili estas denove surkovritaj de la sablo. Estas bone konate, ke urbeto nomata "Hokitiki," estas konstruita plej parte sur ora sablo. Dum plifruaj tagoj miloj da ministoj gajnis vivrimedon prilaborante la sablon sur la marbordo. La oron oni gajnis per diversaj metodoj. La plej efektiva estis la skatolo kovrita per peco el lana litkoverilo. Sed kia oportuno por scienculo! Cent mejlojn da sablo por prilabori, kun iom da oro trovebla ĉie eĉ al granda profundeco. Kredeble ia metodo havigi la oron iam troviĝos.

Ŝajne la plej grava malhelpaĵo de starigita maŝinaro estas la ventega maro. Per skrapegŝipo oni penis gajni la oron, sed la unua ventego dispecigis ĝin. Alia grava malhelpaĵo estas la pezeco de la nigra sablo. Gajni la oron laŭ ordinaraj metodoj estas tro malrapida.

Kun kora manpremo via fidele,
P. H.

NEW PUBLICATIONS.

—
From the British Esperanto Association the following have come to hand:—

INTERNATIONAL RADIO MANUAL, by H. A. Epton, 80 pages, 6d. The contents include a Preface by C. H. Edmonds, a short radio course of Esperanto, English-Esperanto and Esperanto-English Radio dictionary, list of principal broadcasting stations of the world, illustrations of radio symbols with their names in Esperanto and miscellaneous facts. Among the latter, mention is made that "Wireless Weekly," (Australia), has officially adopted Esperanto. Elsewhere it is stated that 3LO Melbourne transmits Esperanto fortnightly and that 3AR Melbourne transmits Esperanto on the last Monday in each month.

A NORMAN CONQUEST, by William Morrison, F.B.E.A.

This is a reprint from one of the B.E.A. publications of the propaganda three act comedy in English. The dramatis personae consist of one male and three females. There are only four characters, (one has a very small part), and as there is only one scene setting, it should be a popular production at Esperanto gatherings.

FOR THE SCHOOL LIBRARY

Spoken Esperanto: Frost

By the DIRECT METHOD for BEGINNERS
Stiff Paper Covers 56 Cents, postpaid

N.W.Frost, 12 Ash Place, Cambridge 38 Mass.

JARRAPORTO DE U. E. A.

La raporto pri la pasinta jaro portas daton januaro-februaro, sed nur nun alvenis Aŭstralion. La raporto estas longa kaj informhava, sed tie ĉie estas necese menciĝi nur la ĉefajn punktojn. La sumo de la aktivoj, (havoĵoj), estas Fr. sv. 11, 143.29. La defikito de la jaro 1924 atingis 6903. 18 fr., t.e. 1302.04 fr. pli ol la defikito de la antaŭa jaro. La enspezoj atingis 14,038 fr. pli al tiuj de la antaŭa jaro. La kresko de la enspezoj estas kaŭzita dank'al la plibonigo de fremda mono kaj la plimultiĝo de la membraro. La kresko de la enspezoj estas ĝojiga, kaj pravas, ke kun bona volo la fina celo—sensulda ekzisto—estas atingebla. La raporto diras, inter alia La kresko de nia Asocio kiel de la movado plej elokvente vidiĝas en la Adresaro de la Delegitoj. Ni transpasis la okan milon. Pagis la regulan kotizon 8073 anoj; aldonu la 192. Dumvivaj Membroj tiam la plena cifero estas 8265. Mankas do ĝis dekmil nur 1735 anoj. Kie ekaperas esp. grupo aŭ izola propagandisto ni demandas ĝin aŭ lin pri la akcepto de la delegiteco. Dum 1924 nia varbado ĉefe direktiĝis al la trovo de transoceanaj delegitoj precipe en Afriko, Ameriko kaj Azio. Kie nia Asocio ne penetris estas Japanujo. Ni donas tiun jaron nian atenton al tiu lando, havanta 2500 organizitajn esperantistojn sed apenaŭ cent anojn de UEA! La kresko de la Delegitaro montras jena komparo: 1923, 1061 delegitoj, 6332 membroj; 1924, 1187 delegitoj, 8268 membroj. Resume ni povas diri, ke la jaro 1924 estis bona; preskaŭ normalaj kondiĉoj financaj, 8000 anoj, defikito ne grave superanta la antaŭan, ĝenerala fido en UEA ĉe la Esperantista publiko. Sed ni ne devas ripozi. Novaj taskoj anonciĝas kaj postulas atenton. Kiel en ĉiuj entreprenoj, la mallaŭdata kaj tamen ŝatata mono decidas, kio estas farebla. Imagu, se ne ekzistus UEA? Certe la movado ekzistus, sed tutcerte estus ankaŭ, ke mankus al ĝi tiu kerno, tiu fokuso, grapiĝanta regule la Esperantistojn, per agado efektiviginta la altan idealon de Dro Zamenhof.

KRONIKO.

MONT ALBERT, V. — La grupo "Espero" ankoraŭ serioze laboras. Kunveno okazas ĉiun mardon kaj la lernantoj faras bonan progreson sub la gvidado de s-ro R. T. Banham, kiu ofte faras provekzamenojn kaj ĉiam kaj ĉiamaniere helpas la studentojn.

TOWNSVILLE, Kvinslando. — Nenia grupo nun kunvenas ĉi tie, sed en la urbo estas kelkaj disaj Esperantistoj. Oni esperas, ke ili baldaŭ starigos grupon.

MELBURN, V. — La Melburna Societo Esperanta regule kunvenadas ĉiun vendredon. La 29an de majo, s-ro Bertram C. Ballard, B.A., lektiis pri "Iuj malfacilecoj de esperanta prononcado." La sonoj menciitaj kiel malfacile akireblaj estis "o" kaj "e"; kaj, ĝuste pro tio, ke ili estas fremdaj al Angla, oni devas lerni antaŭ ol uzi ilin, same kiel oni devas ellerni novajn vortojn por havi plenan vortprovizon. Per desegnoj la parolanto montris kiamaniere la sonoj formiĝas en la buŝo, kaj konsilis sinekzercadon antaŭ spegulo, kiel helpilon en elparolo de la sonoj. S-ro Ballard tiam prialudis du sonojn, kiuj ne devas aŭdiĝi en esperanta prononcado, nome, "er" kaj "uh," kaj montris, ke ili estas uzitaj nur kiam oni malatentas la fonetikan strukturon de Esperanto. Li finis sian interesan parolon per admono ke konstanta praktiko estas necesa, kiel ankaŭ nelaca zorgo dum oni parolas.

La dekduan de junio la Societo havis "Sally McGundy" Vesperon. La diversaj ludoj estis tre interesaj kaj plene streĉis la kapablojn de la partoprenintoj. La mono kolektita, du funtoj do ŝilingoj, estas donita al "La Suda Kruc." (Imitinda ekzemplo por aliaj grupoj, kiuj volus helpi la gazeton. Ed.)

NORTHCOTE, V. — Post trijara ekzisto tiu grupo provizore ne plu kunvenos. Entute ĝi havis 35 membrojn kaj la neznombra ĉeesto estis 20, sed ŝajne nur la persona influo de la fondinto, f-ino Ella Wheeler, povis elveki la entuziasmon de la membroj. La klubo donis sian havon, tri funtojn, al "La Suda Kruc." (Dankon. Ed.)

SIDNEJO, N.S.K. — Tri fojoj dum la pasinta monato stacio 2FC disaŭdiĝis Esperanton. La parolinto

estis s-ro L. E. Pfahl, kiu parolis je la 8-a kaj 23-a Junio kaj 3-a Julio. Jam tiel multaj demandoj pri lernolibroj rezultis, ke almenaŭ sola libro estas aĉetebla en Sidnejo. — Amikoj kiuj deziras sciigi pri proksimaj disaŭdigoj estas petataj skribi kiel eble plej baldaŭ al s-ro Pfahl mem, kies adreso troviĝas sur lasta paĝo. Raportoj pri sukcesa aŭskultado estos bonvenaj por kuraĝigi la sendstacion daŭrigi la disaŭdiganon.

“Wireless Weekly” raportas, ke la Senfadena Instituto de Aŭstralio, (Nova Sudkimruja filio) uzos nur Esperanton kiel helpa lingvo alilande. Ĝis nun ne estis oficiale decidita, sed oni povas atendi la akcepton tre baldaŭ.

“Sydney Esperanto Society” post kelkaj semajnoj ŝanĝos la kunvenojn al “Auto House,” Castlereagh Street, Sydney. Dum junio la klubanoj ĝuis la sekvantan programon. Junio 4 — Unu el la plej interesaj paroladoj aŭdite dumlonge, estis tiu de S-ro F. Dunleavy titolitan “Vivado okcidente de l’Darling Rivero.” La priskribita distrikto lokiĝas en la preskaŭ neprodukta parto de Nova Sudkimrujo, apude de Suda Aŭstralio, kie la parolinto elkjare loĝadis, kaj montris flankojn pri kiuj urbanoj neniam pensas. Junio 11—Konversaciaj rondoj laŭ antaŭaranĝitaj temoj. — Oni bonvenigis s-ron Lauri Laiho, bonkonata finlanda samideano lastatempe loĝinte en Melburno, kiu trapasinte Sidnejon, vojaĝis al Rabaŭl, Nov-Gineo, por tien okupi oficon. Junio 18 — Parolado de s-ro A. Auwart, estona samideano, pri “Fototekniko” klargite de skizoj sur nigra tabulo. Junio 25—Nova dato de jarkunveno. La prezidanto, S-ro Taylor, raportinte pri la pasinta duonjaro montris ĝin kiel sufiĉe kontentiga, precipe la nuntempe kreskanta intereso inter radiukaj kaj radio-aŭskultantoj. Kvan- kam la membraro ne multe pligrandi-

ĝis, la kunlaborado kaj harmonio estis modelaj kaj ĉiudusemajnaj piknikoj plensukcesaj. La financoj ankau staras pli bone, ol iam antaŭe. Li kredis, ke de nun ni povas antaŭvidi rapidan progreson ne nur en la klubon, sed disvastigon de nia amata lingvo ĉie. —Post voĉdono oni elektis la jenan oficistaron por la jaro 1925/26:—Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Vic-Prezidantoj: S-roj F. T. Simon, A. Auwart kaj F-ino Harwood; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl; Kasistino: F-ino V. Fairfield; Kontrolistoj: S-ro D. Healy; Bibliotekisto: S-ro H. Torr kaj Protokola Sekretario: S-ro V. Rutland.

WELLINGTON, Nov-Zelando. — Nia entuziasma samideano S-ro W. H. King, klopodas aranĝi esperantan kongreson en Nov-Zelando. Nia vigla amiko opinias, ke nuntempe estas oportuna por starigi N.Z. Espon. Asocion. Ni kore esperas, ke liaj klopodoj bone sukcesos.

RECEIPTS.

Subscriptions.

Up till 29th June the following sums were received:—Kho Siang, 2/6 (12/25); Congress advts., £2/1/-; L. Griffith, 4/6 (5/26); H. A. Woodman, 4/6 (5/26); N. Higginson, 4/6 (5/26); G. McDonald, 4/6 (5/26); A. Madaraz, 4/6 (6/26); G. Mercer, 5/- (6/26); V. Korjnevsky, 4/6 (3/26); L. O'Connor, 4/6 (6/26); L. Saw, 4/6 (7/26); cash sales, 6d. The subscription and donation acknowledged last month from “R. Reidson” should be “R. Neilson.”

Donations.

Melbourne Esp. Society, “Sally McGundy” Evening, £2/2/-; Northcote Esp. Group, £3; L. Saw, 10/6; W. H. King, 10/-. (Sincere thanks. Ed.)

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET. KEV.

HERE AND THERE.

During December last an official inquiry regarding the knowledge of Esperanto by the Antwerp Police revealed the fact that six members had a knowledge of Esperanto, seven are learning it and 102 are anxious to learn it!

A course of Esperanto for the employees of the Minerva Motor Factory was so satisfactory that a new class has been commenced.

The Universala Esperanto-Asocio wound up the year 1924 with a deficiency for the period of 9170 fr. The annual report shows the number of members according to countries. Australia with 142 members occupies the seventeenth place in a list of thirty nine. In 1924 the cost of each Jarlibro was 1.33 fr.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn jurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Sudo Kruco," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia." Amerika Esperantisto, 2; Amikeco, 4; Arbeiter-Esperantisten, 4; Belga Esperantisto, 120; Bulteno Antverpena Poresperanta Propaganda Komitato, 4; Bulgara Esperantisto, 7; Holanda Esperantisto, 163/4; Heroldo de Esperanto, 31/36; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 90a, 90b; Itala Esperanta Revuo, 4; International Language, 4; La Policisto, 32/3; La Jurnalisto, 1; Liberpensulo, 1; Ligilo por Vidantoj, 1; La Unuigita Tuthomaro, apr.; La Interligilo de l'P.T.T., 30; La Suno Hispana, 95/6; Oomoto, /3; Pola Esperantisto, 3; Sennacieca Revuo, 19; Sennaciulo, 29, 31; The British Esperantist, 240.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Pfahl, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo:

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretario, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.